

# BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1955

N.º 498-499

RIO DE JANEIRO



*XXXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso — III-a Esperantista Eŭkaristia  
Mondkunveno*

*Vidaĵo de la Placo de la Kongreso en 17/7/1955*

*En ĉi tiu loko Pastro Johano Baptista Kao OFM faris saluton en Esperanto*



SEPTEMBRO-OKTOBRO 1955

49-a Jaro

N.º 498-499

**BRAZILA ESPERANTISTO**

«O Esperantista Brasileiro»

Oficiala organo de

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

**A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor principal):

**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:

**Praça da República, 54, 1.º**

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. I.  
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1956**

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto" .....	50,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista .....	100,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto" .....	200,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante ....	300,00
Patrão: recebe o mesmo que o Membro Assinante .....	800,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante .....	4.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO****PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

**XL CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO****A representação do Brasil**

No próximo número daremos pormenorizada notícia do XL Congresso Universal de Esperanto, Congresso do Jubileu, recentemente realizado com extraordinário brilho em Bolonha, na Itália.

A pedido da Liga Brasileira de Esperanto o Governo Brasileiro, pelo Ministério das Relações Exteriores, designou para representar o nosso país nesse Congresso o Diplomata Sr. José Sete Câmara Filho, Cônsul do Brasil em Florença.

**HELPU AL LA MOVADO VARBANTE  
NOVAJN MEMBROJN !**

**CADERNO DAS NAÇÕES****48 páginas**

Bela capa com as bandeiras de  
87 países e a do Esperanto

**Cr\$ 15,00**

Para 10 ou mais: abatimento  
de 10 %

**SERVIÇO DE LIVROS DE B. E. I.****BELO CARTÃO DE NATAL**

Com saudação em Esperanto e  
mais 6 línguas

**Cr\$ 3,00 e 5,00****PAPELARIA UNIÃO**

Ouvidor, 77 — Rio de Janeiro



# BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

SEPTEMBRO-OKTOBRO

N.º 498-499

## “CAPITAL MUNDIAL DO ESPERANTO”

Tratando da realização da III Reunião Mundial Eucarística Esperantista no âmbito do XXXVI Congresso Eucarístico Internacional, a excelente revista *Leitores e Livros*, publicada pela conceituada editora brasileira AGIR, previu que o Rio de Janeiro se tornaria a «capital mundial do Esperanto».

Em verdade o êxito dessa terceira Reunião não poderia ter sido mais brilhante para a nossa causa.

O relatório que publicamos adiante dá conta pormenorizada da intensa actividade desenvolvida durante a semana da Reunião pelos esperantistas católicos, vindos de pontos diversos e com quem se solidarizaram fraternalmente muitos outros samideanos. Na imensa e majestosa Praça do Congresso foi ouvida por centenas de milhares de peregrinos a nossa cara Língua Internacional em vibrante saudação. A imprensa, o rádio, o cinema registraram copiosamente as ocorrências desses dias memoráveis para o Esperanto.

Sem dúvida, o Movimento Esperantista é neutro, mas a sua neutralidade não há de ser negativa: ela é, pelo contrário, positiva, e o Movimento não se alheia de nenhuma manifestação que contribua para o progresso da Língua Internacional.

A Igreja Católica tem repetidamente proclamado a sua inteira adesão à ideia representada pela obra de Za-

menhof — a compreensão entre os homens pelo emprego de uma língua segunda. Desde Pio X, cuja franca simpatia pelo Esperanto é motivo de ufania para os esperantistas, até o actual Pontífice Romano, todos os Papas têm estimulado eficazmente a adopção do Esperanto. Em nosso país grandes vultos da Igreja têm colaborado conosco. Para a III Reunião confirmaram um favor já de muito demonstrado os tres Prelados que chefiam a Arquidiocese: o Arcebispo Metropolitano, Dom Jaime de Barros Câmara, Cardeal Presbítero, os Bispos Auxiliares, Dom Helder Pessoa Câmara, Arcebispo Titular de Saide, e Dom José Vicente Távora, Bispo Titular de Prússiade.

Não sendo ele mesmo uma Religião, o Movimento Esperantista tem muito que aprender da Religião: uma lição de fé e de esperança no triunfo do ideal, uma lição de persistência para que não nos entibiem as dificuldades, uma lição de disciplina para que, livre e conscientemente, nos submetamos às normas sãbiamente recomendadas pelos que tem a suprema responsabilidade da direcção.

Os esperantistas católicos — e antes de todos o nosso muito querido Fr. João Baptista Kao — merecem o mais cordial agradecimento de todos os seus samideanos pelo magnífico trabalho que efectuaram e cujos frutos serão certamente abundantes, substanciosos e duradouros.



## TRIA ESPERANTISTA EUKARISTIA MONDKUNVENO

### OKAZINTA EN LA KADRO DE LA TRIDEKSESA INTERNACIA EUKARISTIA KONGRESO

Rio de Janeiro, la 17-24an de Julio 1955

Retrospektiva rakonto de Pastro D-ro Johano B. Kao O. F. M.

La 36-a Internacia Eukaristia Kongreso, ĵus okazinta en la ĉefurbo de Brazilo, oferis al ni vere grandiozan, emociplenan kaj neforgeseblan spektaklon de fido, de pieco kaj de kulturo. Pli ol unu miliono da fideluloj venintaj el tuta mondo partoprenis kaj aktis en tiu religia dramo. Kvin mil pastroj, tri cent episkopoj kaj ĉefepiskopoj kaj dudek kardinaloj briligis la spektaklon. Dum ok tagoj, la Kongreso funkciigis, tage kaj nokte, tre solenajn ceremoniojn en la vasta placo artefarita en la maro, ĉirkaŭita de belegaj pejzaĝoj.

La plej solenaj kaj plej kortuŝigaj estis sendube la tri solenaj procesioj. La unua bonvenigis la statuon de Nia Sinjorino de Aparecida, Patronino de Brazilo, por prezidi la Kongreson. La dua bonvenigis la Sanktegan Sakramenton de Eukaristio el urbo Niteroi, trapasante sur la Guanabara golfeto per militaj ŝipoj tute ornamitaj kaj lumigitaj. La tria la plej solena, por publike honori la Sanktegan Korpon de Kristo surmetitan en la specialfabrikita granda kaj belega ostensorio, pasanta tra la ĉefaj avenuoj de la urbo, meze de sennombra popolamaso, pie preĝanta, fervore kantanta kaj entuziasme aplaudanta, fermis la kongreson.

Estis tre imponaj ankaŭ la kvin solenaj pontifikaj mesoj, celebrataj de Kardinaloj kaj Patriarkoj, en kvar ritoj, nome Latina, Maronita, Bizantena, kaj Armena, kiuj ne nur elmontris la riĉecon de la Katolikaj ceremonioj sed ankaŭ la universalecon de nia Sankta Eklezio. Je la fino de la lasta Pontifika Meso, celebrata de la Pontifika Legato, la laŭrajtaj reprezentantoj de la Brazila popolo faris solenan konsekron de Brazilo kiel nacio al la sanktega Koro de Jesuo.

Krom la inaŭgura kunsido por bonvenigi la Pontifikan Legaton, Kardinalon Masella, la Kongreso havis kvar Solenajn Kun-

sidojn, en la unuaj horoj de la noktoj de la 20, 21, 22 kaj 23-a de Julio. Iliaj komunaj karakterizaĵoj estas jenaj: 1) Komunaj kantado de la Apostola Kredo latine, 2) mallongaj salutparoladoj faritaj de la reprezentantoj de la fremdlandaj pilgrimantoj, en iliaj naciaj lingvoj; oni aŭdis pli ol kvar dek tiajn salutparoladojn, kaj en la dua solena kunsido, oni aŭdis ankaŭ nian "Esperantistan Saluton", kiu vekis multan intereson por nia kara lingvo. 3) Famaj muzikaj koncertoj, 4) gravaj paroladoj pri kvar aspektoj de la temo "Kristo Savinto kaj Lia Eŭkaristia Regno", faritaj de kvar famekonataj brazilaj verkistoj; 5) plej famekonataj religiaj kantoj; kaj 6) solena beno de la Sanktega Sakramento. Tiuj solenaj kunsidoj estis vere inspirplenaj kaj kormovigaj. La Kongresistoj povis multon lerni por pliriĉigi sian religian kulturon, kaj plifirmigi sian eŭkaristian fervoron.

Okazis sur la Kongresplaco sinsekre tri komunaj komunioj por kvar cent mil virinoj, kaj por kvin cent mil viroj, de ĉiuj sociaj kondiĉoj, kaj por tri cent mil geknaboj. La virinoj kaj la geknaboj ricevis la sanktan komuniojn en la matenaj horoj, sed la viroj ricevis ĝin dum la noktmeza meso. Mia plumo ne estas kapabla por priskribi la grandan entuziasmon, la sinceran fervoron kaj kortuŝantan piecon de la komuniigantaj grupoj. Sendube tiuj komunaj komunioj estis la plej palpeblaj rezultatoj de la Kongreso; multaj gravaj personoj, intelektuloj, ŝtatestoj, politikistoj respektplene alproksimiĝis al la Eŭkaristia tablo.

La Kongreso prezentis al ni ankaŭ dolorigan spektaklon, simboligitan de la "Vivanta Kruc-vojo" de la suferanta Eklezio interne de la Fera-Kurteno, reprezentata de dekkvar nacioj aŭ regionoj de Azio kaj Eŭropo, kiuj estas subpremataj de la sen-



diaj kruelaj imperialistoj; la spektaklo memorigis al la entuziasmaj kaj ĝojplenaj kongresistoj ke mizere vivas kaj barakte suferas pli ol cent milionoj da Kristanoj en tiuj malfeliĉaj regionoj. Kia doloriga spektaklo antaŭ niaj okuloj! La kongreso petis ĉiujn fervore preĝi por niaj suferantaj fra-  
toj en Kristo.

Okazis multnombraj studkunsidoj por la kongresistoj, grupitaj laŭ profesioj, aĝoj kaj organizacioj, kiel ekzemple la studkunsidoj por Pastroj, por Seminarianoj, Religiuoj, por Fratinoj instruistinoj aŭ flegistinoj, por Universitataj Profesoroj, por Gimnaziaj Instruistoj, por Studentoj, por membroj de la asocioj de "Katolika Agado" ktp. La Federacio de la Internaciaj Katolikaj

Katolika Eldonado, pri Historio de la Eklezio en Brazilo, pri Religiaj Poŝtmarkoj k. t. p. Tiuj ekspozicioj, en ilia kunigita kultura valoro, donis al la vizitantoj tre utilajn informojn kaj netakseblan inspiron.

Do la 36-a Internacia Eŭkaristia Kongreso estis vere brilega festo, laŭ ĉiuj aspektoj, ĉu organizaj, ĉu doktrinaj, ĉu kulturaj, ĉu spiritalaj. Jen, en la kadro de tiu belega festo, stariĝis nia III-A Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno (E. E. M. K.), kiu facile atingis la proponitan celon. Ni ŝuldas multon en tiu ĉi aspekto, kiel ni jam diris aliloke, al la bonvolemo de Lia Eminenco S-ro Kardinalo Jaime de Barros Câmara, Ĉefepiskopo de Rio-de-Janeiro kaj Prezidanto de la 36-a I. E. Kongreso, kaj al



*Antaŭ la Preĝejo  
Sankta Francisko  
post la meso  
en 17/7/1955*

Organizacioj havis ankaŭ siajn kunsidojn dum la unuaj tri tagoj de la Kongreso.

Por la suprenomitataj grupoj estis aranĝataj ankaŭ multaj "sanktaj horoj" kaj tute noktaj Eŭkaristiaj adoradoj en la ĉefaj preĝejoj de la urbo. Vere ni povas diri ke la spirito de la kongresistoj-pilgrimantoj tute sin okupis en la studo de la doktrino kaj en la piaĵ ekzercoj rilate al kulto de la Sanktega Sakramento de Eŭkaristio.

La Organiza Komitato de la Kongreso aranĝis diversajn multvalorajn riĉenhavajn ekspoziciojn, i. a. ni citu jenajn: pri Misia Agado, pri Katolika Socia Bonfaro, pri Katekisma Instruado, pri Religia Arto, pri

la simpatia aprobo de Lia Ĉefepiskopa Moŝto Mons. Helder Câmara, la Ĝenerala Sekretario de la Kongreso.

Ekde unu jaro kaj duono antaŭ la Kongreso, ni komencis prizorgi pri la organizo de nia III-a EEMK. Ni faris laŭeble, por ĝi: la necesan propagandon per gazetoj, per radidisaŭdigoj, kaj per nia propra "Internacia Bulteno" dissendita al ĉiuj partoj de la mondo. Ni sukcesis enmeti la programon de nia Mondkunveno en la bulteno de la Oficiala Programo de la Kongreso. Tiel, nia Mondkunveno fariĝis oficiala fako de la Kongreso; oni nomis ĝin "Esperantista Sekcio". Nia afero aperis



tre grava ne nur al ni Esperantistoj sed ankaŭ al la organizantoj de la Kongreso, kaj oni multe esperis de ĝia efiko.

Dank'al la simpatia helpo de la Ĝenerala Sekretario de la Kongreso, ni akiris la uzon de la bela preĝejo kaj de la salono de la famekonata Monaĥejo de Sta. Antono, por niaj specialaj Mesoj kaj por niaj kunsidoj. La Monaĥejo situas en la centra kvartalo de la ĉefurbo kaj tre proksima de la Kongresplaco. Vere tre konvena kunveno.

Je la 14 horo kaj duono de la 17-a de Julio, la unua tago de la Kongreso, ni havis la interkonatiĝan kunsidon, ĉirkaŭ cent gesamideanoj ĉeestis. Mi havis la honoron kaj ĝojon bonvenigi la kongresistojn al nia III-a E. E. M. K., kaj en la nomo de la Konstanta Komitato de la Esperantistaj Eŭkaristiaj Mondkunvenoj kaj en la nomo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) mi salutis la kunvenantojn. En mia inaŭgura parolado, mi skizis la historion de la movado de la Esperantistaj Eŭkaristiaj Mondkunvenoj kaj mi klarigis ilian duoblan celon, t. e. honori Nian Sinjoron Jesuo-Kriston en la Sanktega Eŭkaristio per Esperanto, kaj konigi la utilecon de la universala helplingvo al la ne-esperantistaj kongresistoj. En la nomo de la Loka Organiza Komitato, mi sincere dankis la Brazilan Ligon de Esperanto kaj la Esperantistan Asocion de Rio-de-Janeiro pro ilia bonvolema helpo etendita al nia Mondkunveno. La prezidantoj de ambaŭ organizoj estis kun mi ĉe la tribuna tablo, nome D-ro Carlos Domingues kaj S-ro Délio Pereira de Sousa, kiuj sinsekve salutis la ĉeestantaron en la nomo de la Ligo kaj de la Asocio. Poste, la reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de Brazilo, salutis la Mondkunvenon, en nia kara lingvo. Poste, mi legis diversajn leterojn kaj telegramojn salutdirantajn venintajn de ĉiuj kontinentoj. Dum duonhoro, la kunvenantoj havis tre agrablan fratan konversacion por interkonatiĝi. Fine la horo de la Esperantista Asocio de Rio-de-Janeiro lerte kantis la oficialan himnon de la 36-a I. E. Kongreso, esperantigitan de Profesoro J. B. Mello e Sousa, kio multe kortuŝis kaj entuziasmigis la gesamideanojn. Je la 16-a horo, mi fermis la kunsidon per la preĝoj.

Tuj post nia interkonatiĝa kunsido, la pli granda parto de niaj kunvenantoj iris kaj partoprenis en la Solena Proceso por bonvenigi la statuon de nia Sinjorino de Aparecida, Patronino de Brazilo. La proceso estis vere apoteoza. Ni Esperantistoj marŝadis kun la Verda Standardo kaj du Afiŝoj, kies tekstoj tiel sonas: "Esperantistoj-Pilgrimantoj preĝas por la paco de la mondo kaj la harmonio de la homaro", kaj "Laŭdu Sinjoron ĉiuj gentoj kaj gloru Lin ĉiuj popoloj". Verdaj steloj kaj verdaj flagetoj brilis kaj moviĝis sur la brustoj de ni ĉiuj; kaj survoje ni kantadis ankaŭ la oficialan himnon de la Kongreso kaj diversajn aliajn religiajn himnojn en Esperanto. Nia grupo altiris multan atenton kaj oftan aplaŭdon de la nekalkulebla popolamaso. Ni tamen multe ĝojis ke ni povis publike elkanti la gloron de Dio kaj de la Di-patrinio en nia universala lingvo.

La Mondkunveno aranĝis kvar studkunsidojn en la matenoj de la 18-a, 19-a, 22-a kaj 23-a de Julio. Ĉiu studkunsido, daŭrinta preskaŭ tri horojn, ĉiam ekkomencis kaj finiĝis per mallongaj preĝoj. Du specaj temoj estis traktataj: la unuaj rilatas kun la oficiala temaro de la Kongreso kun la titolo "Kristo Savinto kaj Lia Eŭkaristia Regno", kaj la duaj pritraktis pri diversaj aspektoj de la Katolika Esperanto-Movado. En la kvar kunsidoj, ni aŭdis jenajn doktrinajn referatojn: 1) *La Eklezio estas la Eŭkaristia Regno de Kristo Savinto*, de Pastro Ludwig Thalmaier (Germanujo); 2) *La Gravaj Eraroj modernaj, teoriaj kaj praktikaj en opozicio kontraŭ la Eklezio kiel Regno Eŭkaristia de Kristo Savinto*, de Pastro Gabriel Pausbeck O. Carm. (Usono); 3) *Devoj kaj rajtoj de la individuo kiel civilano en la eŭkaristia regno de Kristo Savinto*, de Pastro Kanoniko Isaias Lagares (Brazilo); 4) *Eŭkaristio nutraĵo kaj kuracilo de la individuo kiel civilano en sia Regno*, de Lia Ekscelenco Mons. José André Coimbra, episkopo de la diocezo de Barra do Pirai (Brazilo); 5) *La pozicio kaj la misio de la kristana familio kiel societo en la Eŭkaristia Regno de Kristo*, de Pastro Modesto Carolfi O.F.M. (Italujo); 6) *Aktualaj eraroj, teoriaj kaj praktikaj, koncerntaj la familion, kaj iliaj rebatoj sur ĝia pozicio kaj misio en la eŭkaristia regno de*



*Kristo*, de Frato Bertino Goerner, (Brazilo); 7) *La Socio laŭ ĝia koncepto kaj ĝiaj ĉiutaga funkcioj en la eŭkaristia regno de Kristo*, de Pastro Francisko de Barros Leal S.J. (Brazilo); 8) *Eŭkaristio — fonto de ĉiu bono socia, homa, universala, nacia kaj individua en sia regno*, de Pastro Antonio Borges S.J.

Ni multe bedaŭris ke mankis al ni sufiĉa tempo por aŭdi ankaŭ tri doktrinajn referatojn nome: 1) *La intensa vivo eŭkaristia, rimedo por multigi la sacerdotajn alvokojn*, de Pastro H.G. Wannemakers S.J. (Nederlando); 2) *Eraroj nuntempaj, teoriaj kaj praktikaj, en siaj rebatoj sur la individuo kiel civilano en la eŭkaristia regno de Kristo*, de Pastro Jean Vernoux, S.C.J. (Francujo); kaj 3) *Eŭkaristio kaj*

(Recife, Brazilo); 5) *Kiel ni povas disvastigi Esperanton inter la katolikoj en Brazilo?* de S-ro Giovanni Faraco (Florianopolis, Brazilo); 6) *Kiel ni povas uzi Esperanton por la utilo de nia Eklezio?* de D-ro Luis de Azeredo Coutinho (Belo Horizonte, Brazilo); 7) *Ĉu ni bezonas unuiĝon de Esperantistoj Katolikaj por faciligi la propagandon de Esperanto en Brazilo?* de Profesoro Euclides da Silva Carneiro (Rio de Janeiro).

Oni povas konstati ke la kultura nivelo de niaj studkunsidoj estis tre alta. Tiel la doktrinaj referatoj kiel la pri-esperantaj paroladoj estis zorgeme preparataj laŭ doktrina kaj lingva vidpunktoj.

La spirita bezono de la kunvenantoj estis ankaŭ prizorgata. Laŭ nia primitiva



*Akcepto ĉe BEL en  
24/7/1955 de la kato-  
likaj esperantistoj  
kiuj partoprenis la  
Mondkunvenon  
(Foto Pedro Real)*

*la savo de la homaro*, de Pastro A. Beckers, prezidanto de IKUE (Belgujo).

Mi devas menciigi ke la "Radio Jornal do Brasil" disaŭdigis nian trian studkunsidon.

Pri la Katolika Esperanto-movado, ni havis vere grandan plezuron aŭdi jenajn interesplenajn kaj tre trafajn paroladojn; 1) *Esperanto kaj Katolikismo*, de D-ro. Mário Riter Nunes (Niteroi); 2) *Esperanto al la servo de nia sankta religio*, de Profesoro Petro Real (Paraná, Brazilo); 3) *Katolika Esperanto-movado en la Tuta Mondo*, de Dro. W. Solzbacher (Usono); 4) *Kiel ni povas disvastigi Esperanton en la katolikaj rondoj, precipe inter la katolikaj virinoj?* de F-ino Lourdinha Galvão Cordeiro

programo, devis okazi ses mesoj specialaj por Esperantistoj-Pilgrimantoj; sed por plifaciligi la partoprenon de ĉiuj en la solenaj ceremonioj de la Kongreso, ni reduktis ilin duone, sekve nur tri Mesoj specialaj por nia Mondkunveno okazis en la preĝejo de Sankta Antono, en la matenoj de la 18-a, 20-a kaj 24-a de Julio. Dum tiuj mesoj, ni preĝis kaj kantis en Esperanto. Pastro Kannoniko I, Lagares eksplikis la unuan meson Esperante kaj Portugale. Lia Episkopa Moŝto Mons. José André Coimbra celebris la duan meson, dume Pastro Antonio Borges S.J. predikis en Esperanto pri la "Eŭkaristio, sakramento de Amo"; kaj la Radiostacio Continental de longa kaj mallonga ondoj disaŭdigis tiun Diservon. Mi mem



havis la honoron celebri la trian Meson de dankesprimo, kaj mi mallonge predikis Esperante admonante niajn karajn gesamideanojn ke ili estu ĉiam pli fervoraj servantoj kaj adorantoj de Jesuo-Kristo en sankta Eŭkaristio, kaj ke ili restu konstante fidelaj civitanoj en la Eŭkaristia Regno.

Krome, niaj kunvenantoj laŭvole partoprenis la solenajn Pontifikajn Mesojn kaj aliajn ceremoniojn en la placo de la kongreso. Nia grupo marŝadis en la lasta solena procesio, portante la Verdajn Standardojn kaj la du supremenciitajn afiŝojn, kiel ni faris en la procesio de la unua tago de la Kongreso.

La Loka Organiza Komitato havigis al ĉiuj kongresistoj la "Kulturajn Vesperojn", kiu okazis je la 20-a horo de la 21-a de Julio, en la bela salono de la ŝtata Kolegio Pedro II. Dum du horoj, niaj gesamideanoj, plezure kaj ĝue, aŭskultis la deklamadon de dek literaturaj pecoj, ĉu en verso ĉu en prozo, ĉu originalaj, ĉu tradukitaj en Esperanto, kaj dekdu religiajn kaj folklorajn kantojn. Jen la literaturaj: *Virina Dediĉo*, de anonima verkistino; *Laboru, ne Revolu!* de S.W. Smith; *HOMO*, de Pastro Dombrowski; *Hejme...!* de S-ro Walter Mudrak; *Ĉio Forpasas!* de Pastro Cnirca O.F.M.; *Dankkanto al Eternulo*, de David, tradukita de D-ro Zamenhof; *Kanto de Frato Suno*, de Sankta Francisko, tradukita de Pastro Caroli O.F.M.; *Al mia filino*, de Borges de Barros, tradukita de Valdomiro Lorenz; *Salutpoemo al nia III-a E.E.M.K.*, de S-ro Petro Golobiĉ (Usono); *Pri la prudento en nia agado*, elimitado de Kristo, tradukita de Frato Van Zon.

Kaj la listo de la kantoj estas jena: 1) Tagiĝo, 2) Sankta Lucio, 3) Eta Brunkruĉo, 4) Katolika Himno, 5) Pasintaj Tagoj, 6) Por Kristo Reĝo, 7) Paca Nokto, 8) Senmakula, 9) Ho mio lando, 10) Bonan Nokton!, 11) Himno de la 36-a I.E.K., kaj 12) La Espero. La horo de la Esperantista Asocio de Rio-de-Janeiro, gvidata de Profesoro Nilo Borges, kaj la horeto de Profesoro Petro Real alterne kaj lerte realigis la kantadon, kiu provokis entuziasman kaj dankan aplaŭdon de la plena salono. Frato Bertino Goerner, Pastro Francisko de Barros Leal kaj Antonio Borges S.J., Fraŭ-

linoj Lourdinha Galvão Cordeiro, Yolanda Evangelista, Margarida Ritter Nunes, Profesoroj J.B. Mello e Sousa kaj Euclides da Silva Carneiro laŭvice faris la deklamadon kun ĉarmo kaj lerteco. F-ino Olivia Borges ludis la pianon. Profesoro Mello e Sousa direktis la programon. Kaj du radistacioj, nome "Radio Vera Cruz", kaj "Radio Jornal do Brasil", disaŭdigis komplete nian "Kulturajn Vesperojn", per longa kaj mallonga ondoj. En la originala programo por nia "Kultura Vespere", ni projektis la prezentadon de iu religia dramo kun titolo "Heroo de Eŭkaristio", dramo ĉine verkita de Profesoro Sheng Kun-Pu kaj esperantigita de mi por la uzo de nia Mondkunveno. Bedaŭrinde la manko de taŭgaj ludantoj nebligis la prezentadon.

La III-a E.E.M.K. sendube faris grandegan propagadon por nia kara universala lingvo. Dum ses monatoj antaŭ la kongreso, la gazetoj kaj radistacioj de tiu ĉi ĉefurbo parolis ofte pri nia afero. Du semajnojn antaŭ la Kongreso, la Radistacio de la Ĉefurbestrejo petis famekonatan kantiston Pastron José Mojica O.F.M. kanti la Esperantigitan tekston de la Oficiala Himno de la Kongreso; li fakte kantis, kun la helpo de Esperantista Ĥoro, kaj li parolis favore pri la utileco de Esperanto. Kvin tagojn antaŭ la kongreso, la Radistacio Continental disaŭdigis mian dekkvin-minutan paroladon en Esperanto pri nia Mondkunveno, je la plej aŭskultata horo 21-22-a de la nokto, kaj la Stacio ripetis la disaŭdigon dufoje dum la Kongreso, ĉar oni registris mian paroladon sur disko, en la momento de la intervjuo. Diversfoje dum la solenaj ceremonioj sur la Kongresplaco, mi devis mallonge paroladi en Esperanto antaŭ la mikrofonoj, tie instalitaj por diri mian impreson kaj por saluti la Esperantistojn kiuj ne havis la feliĉon ĉeesti la mirindan okazintaĵon. Kaj la 20-an de Julio, je la oka horo vespere, la Radistacio Guanabara dissendis mian intervjuon de tridek minutoj en Portugala lingvo pri la religia situacio en Ĉinujo kaj pri nia III-a E.E.M.K. Ĉiutage, dum tuta la Kongresa semajno, la gazetoj kaj la radistacioj senĉese publikis kaj disaŭdigis la programon de la Kongreso, kiu enhavas ankaŭ la nian, pro tio, oni senĉese aŭdis kaj legis la novaĵojn de



nia Mondkunveno. Ankaŭ la laŭtparolilo de la Kongresplaco, kiam ĝi anoncis la programon. La vorto "Esperantista" fariĝis tre familiara por la tuta Kongreso.

Supre mi menciis pri nia "Esperantista Saluto" al la I.E. Kongreso. Kvankam mi ne deziris aperi tro-publike dum la Kongreso, sed tamen mi prenis la taskon adresi tiun saluton. Tio okazis dum la dua solena kunsido. La kongresplaco estis plenplena de nekalkulebla popolamaso kun ĉeesto de tricent Episkopoj kaj dudek Kardinaloj. Post la kantado de Apostola Kredo, post la omaĝo farita al kvar persekutataj Kardinaloj kaj post salutparoladoj faritaj en Nederlanda kaj Angla lingvoj, mi ekparoladis en Esperanto. Mia elparolado estis laŭta, malrapida sed tre klara. Mi povis aŭdi ĉiun vorton de mia parolado resonantan en la ekstremaj anguloj de la placo. Silente kaj religie aŭskultis la tuta amaso, ĉar mia parolado estis novaĵo por la plimulto de la ĉeestantaro. Je la fino de miaj salutvortoj, oni tre simpatie aplaŭdis. Kiam mi diris la lastan frazon de mia parolado, mi aŭdis naŭ batojn de la granda horloĝo ĉe Mesbla Turo, kiu staras proksime de la kongresejo. Al mi ŝajnas ke mi uzis ses aŭ sep minutojn por adresi nian "Esperantistan Saluton", kiun aŭskultis multaj samideanoj kaj neesperantistoj per radiaparatoj kaj televidiloj. La sekvantan tagon, diversaj gazetoj publikis la tradukon de mia parolado, kaj la gazetagentejoj kiel "United Press" menciis ĝin en siaj depeŝoj. Rilate al la enhavo de salutparolado, mi esprimis tri ĉefajn ideojn, dirante ke ni Esperantistoj multe ĝojas pro nia partopreno en tiu grandioza Kongreso, kiu ebligas nin uzi nian karan lingvon por kanti la gloron de nia Savinto Jesuo-Kristo en la Sankta Eŭkaristio, kaj ni esperas kaj fervore deziras ke niaj Katolikaj fratoj estu konvinkitaj pri la utileco kaj neceseco de la universala helpingvo por la disvastigo de la sankta Evangelio, kaj por faciligi la internaciajn kunvenojn de niaj diverslandaj samkredanoj, kiel la nunan Kongreson, kaj fine, en la nomo de la Esperantistoj de la tuta mondo, mi respektplene salutis la Kongreson kaj tutspeciale, en la persono de la Pontifika Legato, la Sanktan Patron, Papon Pio Dekdua, la Vikario de Kristo sur

la tero. Verŝajne, unuan fojon, iu Esperanta parolado estis farita antaŭ tiom multaj personoj. Tiu ĉi fakto ĝojigis la tutan ĉeestantaron de nia Mondkunveno, kaj ĉin kredas ke nia "Esperantista Saluto" faris la plej efikan propagandon por nia movado.

La III-a EEMK finis la lastan studkunsidon je la tagmezo de la 23-a de Julio,



Dum la akcepto en BEL Pastro J. B. Kao dankas por donaco de *Fundamenta Krestomatio*. Rio, 24/7/1955.  
De maldekstre dekstren A. C. Coutinho, C. Domingues, Azeredo Coutinho, Pastro Kao, J. B. Melo e Sousa.  
(Foto Pedro Real)

Sabato. Sed posttagmeze, je la 16-a kaj 19-a horoj, sinsekve la Brazila Esperanto-Ligo kaj la Esperantista Asocio de Rio-de-Janeiro kune kun la Kultura Kooperativo preparis festenojn por ricevi la gesamideanojn kiuj partoprenas en la Eŭkaristia Kongreso kaj nia Mondkunveno. Ili regalas nin per bongustaj manĝaĵoj kaj per dolĉaj trinkaĵoj. Ni kune pasigis kelkajn horojn tre agrablajn inter niaj Brazilaj samideanoj kaj samcelanoj. Ni neniam forgesos ilian bonkorecon. Sed ili surprizigis min per korduŝiga donaco, kiu konsistas el du belaj volumoj de nia literaturo, nome "Fundamenta Krestomatio", de la 17-a eldono, kaj "Fabiola", de la dua eldono. Interne de la kovrilo de la F. Krestomatio, la Ligo skribis jenan afablan dediĉon: "Al la eminenta samideano Pastro Johano B. Kao, kun kora danko de la Brazilaj Esperantistoj pro la granda laboro farita de li por la Movado en la III-a E.E. Mondkunveno, 23-7-55"; kaj sur la volumo de "Fabiola" la Esperantista Asocio kaj la Kultura Kooperativo jene dediĉas: "Al la eminenta



# APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

## O CARACTER

O caracter é a disposição d'alma, como o porte é a compostura do corpo.

O primeiro, íntimo, é tendência que se traduz em actos; o segundo é o jeito que se manifesta em atitudes.

Moŝto Pastro Johano B. Kao O.F.M., kun sincera esprimo de estimo kaj admiro tutkore ni donacas tiu-ĉi memoraĵon, 23-7-55". Post la dediĉaj vortoj, sekvas multnombraj subskriboj de niaj karaj gesamideanoj. En la nomo de la Ligo, meze de multnombraj ĉeestantoj, Profesoro J.B. Mello e Sousa prezentis la donacon al mi kaj fariŝ bonvoleman paroladon rilate al mia laboro por organizi nian Mondkunvenon. Ĉio tio profunde kortuŝis min. Mi ekparolis kaj mi elkore dankis niajn Brazilajn samideanojn pro ilia granda ĝentileco kaj valora donaco, kaj mi asertis ke estis mia devo labori, laŭ mia modesta forto, por nia movado dum la I.E. Kongreso, kaj ke la bonaj efektoj kaj fruktoj de la III-a EEMK rezultis el Dia beno kaj el la sindonema kunlaboro de la membroj de la Loka Organiza Komitato kaj de multaj aliaj gesamideanoj brazilaj kaj fremdlandaj.

Verdire, por mi, la konstanta laboro farita dum pli ol unu jaro por prizorgi pri nia III-a E.E.M.K. ne nur ne kaŭzis al mi iun ajn penon aŭ doloron, sed kontraŭe ĝi donis al mi multan ĝojon kaj konsolon. Hodiaŭ mi tutspeciala ĝojas, ĉar mi povas vidi, en la tridekjara datreveno de mia Esperantistiĝo, la bonajn rezultatojn de miaj modestaj klopodoj por disvastigi Esperanton, ĉi-foje per starigo de la III-a E. E.M.K. Nun por konkludi, mi nur deziras konsili al ĉiuj Esperantistoj, precipe la Katolikaj ke ili interesiĝu pri la movado de la E.E.M.K. kaj nepre klopodu starigi ĝin en la venontaj Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj. Memoru, karaj fratoj, memoru ke la sindonema kunlaboro de ĉiuj certe, certege produktos pligrandajn centoble pligrandajn fruktojn.

Como os componentes do corpo precisam do apoio do esqueleto, a alma precisa do caracter, que é a estrutura em que se firma.

Assim como o homem, em sociedade, deve comportar-se com decência e nobreza, guardando o respeito que a boa educação impõe, assim também lhe corre a obrigação de atender a todas as conveniências da moral e da disciplina, portando-se com altivez, sem soberba, discorrendo sem presunção, trazendo a sua palavra límpida e acudindo com ela, em réplica, ao ataque, sempre, porém, com generosidade nobre, preferindo desarmar a ferir o adversário.

Todas as virtudes apóiam-se no caracter, que é a energia que nos mantém a prumo; uma vez, porém, que consintamos em vergá-lo, dificilmente o restabeleceremos na primitiva posição e já não terá a inflexibilidade, que era a sua linha honesta, porque nele sempre se há de sentir a volta por onde se dobrou.

O trecho acima dado, cuja tradução virá no próximo número, é da lavra de Henrique Coelho Neto, um dos mais fecundos e apreciados escritores brasileiros. Coelho Neto foi também muito simpático à língua de Zamenhof, e é no Brasil um dos autores mais traduzidos em Esperanto.

## CURSOS POR CORRESPONDÊNCIA

Elementar (inclusive o livro necessário) . . .	100,00
Superior . . . . .	200,00
Magistral . . . . .	300,00



## ARTUR AZEVEDO

La 7-an de la ĵus pasinta monato Julio okazis la jarcento de la naskiĝo de Artur Azevedo, unu el la plej ŝatataj brazilaj verkistoj, kaj fondinto de la Brazilia Beletristika Akademio.

Artur Azevedo ne povas esti forgesita de la brazilaj esperantistoj, ĉar li estis la unua brazilano, kiu publikigis sciigojn pri nia lingvo. Efektive, en *O País* (La Lando), grava, multlegata ĵurnalo el Rio de Janeiro, lia kutima ĉiutaga artikolo *Palestra* (Interparoladeto) presita la 12-an de Junio 1898 temis pri Esperanto kaj finiĝis per la transkribo de Patro Nia (*Pater Noster*, tradukita Esperanten de D-ro L. Zamenhof). Ni ŝuldas lian simpatian por Esperanto al D-ro Jácome Martins Baggi de Araújo, kiu liveris al li Esperantajn broŝurojn kaj la 1-an n-ron de la gazeto *L'Espérantiste*.

Post kelkaj tagoj, ankoraŭ en Aprilo, dua *Palestra* aperis, kun danka letero de Baggi de Araújo, skribita en Esperanto; Azevedo transkribis la tutan leteron kaj aldonis, ke la scivolemaj legantoj provu ĝin traduki.

---

## ESPERANTO PELO RÁDIO

### Dois novos cursos no Rio de Janeiro

Anunciamos com júbilo aos nossos leitores que estão funcionando nesta capital dois novos cursos de Esperanto pelo rádio, ambos em estações oficiais — a Rádio Ministério da Educação e Cultura e a Rádio Roquette Pinto da Prefeitura do Distrito Federal.

Esses cursos tiveram início em 20 de Agosto último, e nesse dia, na primeira das

citadas estações, foi entrevistado o Presidente da Liga Brasileira de Esperanto, Dr. Carlos Domingues, que falou sobre o nosso Movimento.

Eis aqui as indicações sobre os dois programas:

RÁDIO MINISTÉRIO DA EDUCAÇÃO E CULTURA — PRA-2 e PRL-5 — Frequência: 800, 9770, 11950 e 17875 quilociclos — Programa: “Esperanto, Língua Internacional” — Horário: sábado, das 14.30 às 15.00 — Programador: Luís Carlos Nunes D’Angelo — Professores: Torres Pastorino e Jorge de Souza Neves — Endereço da estação: Praça da República, 141 A, Rio de Janeiro, DF.

RÁDIO ROQUETTE-PINTO (da Prefeitura do Distrito Federal) — PRD-5 — Frequência: 1400 quilociclos — Programa: “Esperanta Radilernejo” — Horário: sábado, das 8.05 às 8.30 — Programador: Sílvio Péllico Machado — Professor: Floriano Pessoa — Endereço da estação: Av. Almirante Barroso, 81 — 12.º andar, (Edifício Andorinha), Rio de Janeiro, DF.

Pela realização desses dois importantes empreendimentos devemos agradecimentos aos Srs. Dr. Fernando Tude de Sousa, Director do Serviço de Rádiodifusão Educativa, e René Cavé, Director Artístico, na Rádio Ministério da Educação; e Srs. Prof. Haroldo Lisboa da Cunha, Secretário da Educação e Cultura, Dr. José do Ribamar Martins Castelo Branco, Director da estação, e Dr. Armando de Queirós, Director Artístico, na Roquette-Pinto. Foi muito valiosa a acção dos nossos caros samideanos Luís Carlos Nunes D’Angelo, na primeira, e Prof. Sílvio Péllico Machado, na segunda.

Esperamos que os programas sejam ouvidos pelos nossos leitores e que eles escrevam às estações. Os cursos, como é natural, devem interessar particularmente os alunos por correspondência para rectificação da pronúncia.

---

**PAGU FRUE VIAN KOTIZONI!**





## LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,  
Medeiros e Albuquerque,  
Viriato Correia**

XVI

### LA POLICAJ HUNDOJ

La paroloj de Albergaria, enŝovigante konfuzamase en la orelojn de Melo Bandeira, invadis al li la kranion, kaj tio iĝis (se oni povas fari tian komparon) simila al la ronda placo ĉe Palaco Monroe en tago de patriotisma scenigo.

La kompatinda viro, eksurdigita, miregigita, turnis afflakte la okulglobojn, spirante avide, plengorĝe, kvazaŭ minacata de apopleksio. Kaj en la interno, en la osta kesto, kvazaŭ kriegataj per grandega laŭparolilo, tondris la gravtonaj vortoj de la ruza murdinto: "En murdo, kiel tiu de la bankiero Sanches Lobo, kie devas esti la indicoj? Ĝuste tie, en la loko de la krimo. Kaj ĉu la Polico jam iris tien por esplori la lokon?"

Melo Bandeira saltis, kvazaŭ li estis pikvundita de vespo, kaj sin ĵetegante tra la koridoro iris rekte al la telefono kaj petis komunikon kun Centro 4820. Kaj li kriis:

— Ĉu tie estas la Polica Kazerno? Ĉi tie parolas Melo Bandeira. Jes. Voku Taborda-n al la telefono.

Post momentoj rapidege, kiel ciklono, la granda detektivo, ekprenante ĉapelon, la unuan, kiun li trovis ĉe la mano, marŝis faletante tra la ŝtuparo de la distrikta policejo, ĉiam aŭdante, per imagaj voĉoj, la bruajn parolojn: "... Kie devas esti la indicoj? Ĝuste tie, en la loko de la krimo".

Pasis tiam luaŭtomobilo. Li okupis ĝin kaj ordonis veturon al la palaceto de Sanches Lobo.

En lia frenezeco ĉiuj bruoj sonis al li kiel la saĝaj paroloj, kiujn li estis aŭdinta. Se la ŝoforo trumpetis, alproksimiĝante al stratangulo aŭ por averti distriĝeman vojiranton, en la trumpetsono Melo Bandeira aŭdadis: "En murdo, kiel tiu de Sanches

Lobo..." Knabo, kiu krie disvendis ĵurnalon, diris al li klare: "Ĝuste tie, en la sama loko de la krimo..." Kaj dikega virino, kiu ĵetis la grandan bruston sur la apogilon de fenestro, kriis al mulatino kun okulfrapanta hararaĉo, kiu svingetiĝante frapis per la pintaj pantofloj la kontraŭflankan trotuaron: "... Kie devas esti la indicoj?"

— Rapidiru, al la diabloj! — kriis Melo Bandeira al la ŝoforo.

Kaj la aŭtomobilo kvazaŭ flugis, minacante vivojn, tra fantazia bruado de voĉoj, nur aŭdataj de la obsedita policano, kiuj diris: "En murdo, kiel tiu de la bankiero Sanches Lobo..." "kie devas esti la indicoj?..." "Ĝuste tie, en la loko de la krimo..."

La palaceto de Sanches Lobo estis plena de homoj. Melo Bandeira sin ĵetis al la ĝardeno ne atentante al la ŝoforo, kiu postulis la pagon de la veturo, kaj kvar post kvar li supreniris la ŝtupojn de la marmora ŝtuparo, kie li trovis Bonifacon, nigrestitan, gravmienan, kiu akceptis la personojn, kiuj venis por fari la lastan honoron al lia mastro.

Vidante, ke Melo Bandeira antaŭeniras rapidege tra la verando, kvazaŭ li sin direktus al la manĝoĉambro, la maljunulo ekkuris post li, vokante lin:

— Pardonu...

Melo Bandeira sin turnis rigidmiene, kaj la maljuna servisto, sin klinante respekte, diris al li:

— Certe vi volas vidi la mortinton, mian malfeliĉan mastron. Li estas tie, en la vizitĉambro. Venu kun mi. La funebra iro estos je la kvara.

La maljuna servisto, kiu estis babilema, estus daŭriginta la detalegan rakonton, se Melo Bandeira ne estus interrompinta lin kun aŭtoritato:

— Tute ne gravas al mi la funebra iro. — Kaj metante al li la manon sur la ŝultron: — Diru al mi: ĉu oni tuŝis la kadavron? Ĉu oni faris ion?

— Jes, sinjoro, oni razis lin. Ĉar la mastro neniam eliris el hejme ne razinte sin, mi havis la ideon venigi barbiron el la najbarajo.

Melo Bandeira ne retenis la koleron kaj, kaptante la maljunulon per la vestko-



lumo, skuis lin forte, dirante al li antaŭ la nazo, kun fermitaj dentoj:

— Idioto! Idioto! Kaj la postsignoj, grandega stultulo! Nu, la viro estas murdita, gorgpremita, ho azeno! gorgpremita! kaj vi venigas barbiron, por ke li deskrapu la postsignojn de la krimo?! Kaj se mi respondigus vin? Jes! Parolu! Se mi respondigus vin?! Se mi respondigus vin?!

— Pardonu! Vi traktas min... Permesu, ke mi demandu: kun kiu mi havas la honoron paroli?

— Kun la Polico. Tio sufiĉas.

Li faris du pugnobatojn en la aero, ekkriante kun abomeno:

— Razita! Bestulo!

Sed, kun subita inspiro, li demandis:

— Ĉu estas homoj tie kun la mortinto?

— Vi demandas, ĉu estas homoj? Estas tiel, sinjoro. — Kaj Bonifaco kunigis la fingrojn de ambaŭ manoj por esprimi amason. — Mi eĉ timas, ke en tiu homamaso (ĉar mi ne konas ĉiujn) estas iu ŝtelisto, kiu kun la preteksto, ke li pririgardas la mortinton, ŝtelos ion. Post tio, kio okazis en ĉi tiu domo, vi komprenas, oni devas esti tre singarda. Kun mia konsento neniu enirus ĉi tien. Mortinte, finiĝinte. Sed kion oni povas fari?

— Jes.

Melo Bandeira esploradis silente la verandon, iradis de unu pordo al alia, levprenadis bagatelojn sur la planko. Subite pro tintado de sonoriletoj li levis la kapon.

— Ĝi estas ili! — li ekkriis direktiĝante repede al la ŝtuparo.

— Ili, kiuj, sinjoro? Ĉu eble vi malkaŝis ŝtelistojn en la domo? Ĝuste tio ŝajnis al mi. Estas tie kelkaj vizaĝoj... Vidu, estas tie iu malgrasegulo, kiun, se mi tute ne trompiĝas, mi vidis hieraŭ per miaj propraj okuloj en la distrikta policejo... Vidu, mi tuj fermos la pordon, kaj tiel vi arestos ĉiujn, kaj inter ili estos la murdinto de mia malfeliĉa mastro.

— Sed, diablo, kion vi estas diranta?...

— Mi parolas pri la ŝtelistoj.

— Kiuj ŝtelistoj? Ĉu mi parolis pri ŝtelistoj?

— Ĉu vi ne diris: Ĝi estas ili?!

— Ili? Ho! jes. Ĝi estas ili, la hundoj...

— Ĉu la hundoj?

— Jes, la hundoj, kiujn mi venigis el la Policejo. Mi igas ilin flari la kadavron... Kaj pri tio: ĉu vi ne lavis la kadavron?

— Tre malmulte, sinjoro. Li estis pura. Li estis baninta sin en la dimanĉo laŭ sia kutimo. Sed vi estis diranta ke... vi igas la hundojn flari la kadavron...

— Kaj poste mi malliberigas ilin. Ili iras per la flaro kaj malkovras la murdinton.

Polica omnibuso haltis antaŭ la pordego de la palaceto, kaj Melo Bandeira sin ĵetis tra la ŝtuparoj demandante kun kriegoj:

— Ĉu Bruzundanga venis? Hola, Taborda! Ĉu vi portis Bruzundanga-n?

Sovaĝaj bojoj respondis el la omnibuso al la demando de la estro de esplorservo, kaj du viroj, malfacile retenante du hundoŝnurojn, en kiuj skuigis fortege ses timegindaj policaĵoj, malsupreniris sur la trotuaron, kaj unu el ili, varioldifektita, kun kropo, kiu kovris al li la malpuran kolumon, ŝvitegante, diris malbonhumore:

— Jen estas Bruzundanga, Majoro, jen estas li. Tamen atentu pri tiu besto. Tio estas furiozega hundo! Se vi malliberigos tiun sovaĝan beston en tiu domo kun tiu mortinto kaj kun ĉiuj homoj, kiuj estas tie, mi ne scios, kio okazos. Mi opinias, ke tio estos danĝero. Fine, vi scias pli bone, ol mi, kion vi faru. Jen estas Bruzundanga. Jen estas Bruzundanga, jen estas la du belgaj hundoj, la nederlanda, kaj la du francaj hundinoj. Se estas nur por trakuri la domon, bone... Ni vidu.

— Ne! Estas necese, ke Bruzundanga flaru la mortinton. Kompreneble la murdinto metis al li la manon sur la gorĝon.

Kaj memorante pri la razo, li denove koleris:

— Stultulo!

— Kial stultulo, Majoro? Mi diras tion, ĉar mi konas la hundojn. Vi vidis.

— Mi ne parolas al vi, Taborda. Nu, malliberigu la hundaron en la ĝardeo, kaj ni iru en la ĉambron kun Bruzundanga, por ke li flaru la mortinton.



## LA VIII ARGENTINA ESPERANTO-KONGRESO

Luis de Azeredo Coutinho  
(Fino)

La respondo al la "Demando" estis plej favora kaj simpatia al ni, brazilanoj. Cetere, ni ja bone scias kaj kalkulas pri la konstanta kaj frata amikeco de niaj sindonemaj argentinaj samideanoj.

## DUA LABORKUNSIDO

Tuj post la elekto de la estraro de la Argentina Ligo por la venonta jaro, estis aprobita la laborplano por la sama periodo. Inter aliaj, estis aprobitaj la jenaj proponoj: a) Starigi kursojn, kunordigitajn kun similaj kursoj orga-

La viro kun la kropo, kiu estis Tabora, kaŭriĝis grumble murmurante kaj diris al la kunulo:

— Malligu la bestojn.

— Por kio?

— Por ke ili faru la servon. Mi tuj malligos la francajn hundinojn kaj kondukos Bruzundanga-n supren. Tio iĝos terura komplikajo. Vi vidos.

— Jen, Majoro!

— Antaŭen! — ordonis Melo Bandeira.

Kaj la du viroj malfermis la pordegon, kaj kvin policaj hundoj sin ĵetis en la ĝardenon kurante furioze, supreniris la ŝtuparon, kaj post momentoj homoj forkuris kriante, aliaj sin ĵetis tra la fenestroj kiel en vera infero.

Kaj Bruzundanga, ekscitita de la bruo, kiu venis el la funebra domo, kun abrupta ekmovo sin fortiris de la manoj de Tabora kaj ekatakis senbride la verĝandon.

Bonifaco preskaŭ ne havis tempon por grimpi sur kolonon kaj maletendi la kru-rojn; kaj en la mortintoĉambro pro la eniro de la terura besto restis nur la bankiero. Vaksandelego, falinte, transigis la fajron al la drapoj de la katafalko. Kaj Bruzundanga sin ĵetis al la mortinto.

COELHO NETO — Tradukis K.

nizataj de Brazila Esperanto-Ligo; b) pligrandigi la servon pri informado; c) organizi cirkulantajn ekspoziciojn, kun la celo penetri ĉiujn angulojn en la lando; d) pristudi la eblecon eldoni novan instrumentodon, alĝustigitan al la landaj postuloj; e) eldoni taŭgan materialon por informado. Estis ankoraŭ alprenitaj aliaj decidoj kaj rekomendoj, pri kiuj ni povos legi en "Argentina Esperantisto", oficiala organo de la Argentina Esperanto-Ligo, kiu publikigos kompletan raporton pri la Kongreso.

Ĉe la fino de ĉi tiu kunvido, la reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, transdonis al la kongresa prezidanto la jenajn memordonacojn, senditajn de la menciita Ligo: unu diskon, gravuritan en Esperanto de la brazila samideano Norma Guerrini; belegan kolorigitan foton, prezentantan la monumentou al D-ro Zamenhof, starigitan ĉe Placo en Belo Horizonte, ĉefurbo de la ŝtato Minas Gerais; kaj plie unu ekzempleron lukse binditan de la Historio de tiu urbo, en Esperanto.

D-ro Carlos Rezende, Prezidanto de la "Sociedade Mineira de Esperanto", dankis la ĝentilajojn faritajn al la brazila karavano.

Poste, ĉiuj ekstaris kaj kantis unuvoĉe la himnon "La Espero", per kiu finiĝis la kunvido.

Mi deziras ankaŭ esprimi mian sinceran ĝojon pro la disciplino, kiu karakterizis la laborkunsidojn de la VIII Argentina Kongreso de Esperanto. Ĉio estis farita en plej serioza kaj nobla etoso. La argentinaj esperantistoj luktadas por nia movado senlace kaj harmonie. La rezultato estas tiu, kiun ni ĵus konstatis. Elkore ni gratulas ilin!

Je la 13-a okazis bankedo, ĉe restoracio "Cifre", en strato Sarmiento, 716. Tiu restoracio estas vera arta mirindaĵo.



Ĝia ampleksa salono, konsiderata kiel unu el la plej luksaj en la tuta Ameriko, vidigas sur siaj muroj altreliefojn kaj bareliefojn, faritajn de famaj artistoj pri baroko.

La bone elektita menuo kaj la bongustaj argentiaj vinoj plaĉis al ĉiuj. Samtempe, ni ĝuis la ensorĉantan kamaŝadon, kiu regis tie. Almenaŭ cent personoj partoprenis tiun bankedon.

Prof-ro Hess salutis ĉiujn kongresanojn, kaj Prof-ro Calógero faris specialan saluton al ni, brazilanoj, en Esperanto. Komisiito de nia karavano, dankis D-ro Carlos Rezende.

Ĝi estis belega festo, kies memoron por ĉiam ni gardos.

Post la bankedo, ni gaje promenadis tra la urbo. Ĉe la Rosaria Monumento al la Nacia Standardo oni fotografis la kongresanaron, sed mi bedaŭras, ke mi ĝis nun ne sukcesis havigi al mi ekzempleron.

En la momento, kiam oni klopodis por grupigi la kongresanaron, por fari la fotografajon, mi havis la grandan honoron konatiĝi kun ia fama kaj tutmonde konata rosaria pentristo E. Fornells, simpata maljunulo, kiu afable invitis nin viziti lian konstantan ekspozicion. Ni volonte akceptis lian inviton, kaj, okaze de nia vizito, li donacis al ni malgrandigitajn Kopiojn de siaj plej famaj pentraĵoj. Akompanataj de nia karega Villafranca, ni pasigis ĉe li agrablajn momentojn, tute katenitaj de lia instrua konversacio. La ceteraj kongresanoj vizitis la ĵurnalojn.

Nepriskribeblan agrablan surprizon al ni rezervis niaj argentiaj amikoj, vespere. Efektive, je la 18-a ni ĉeestis brilan kaj notindan artan feston, plenumitan de la Folkloro Universitata Grupo "Los Chalanés". Tiu Grupo konsistas el universitataj junuloj, kiuj kun profunda admirinda sento, interpretas belegajn kanzonojn, kiuj, per siaj melodioj, penetras ĝis la fundo de nia koro. Kion diri pri "De que te vi" (De kiam mi ekvidis vin), de Luiz Bahamonde, kaj pri "Linda la vida mia" (Belega estas mia vivo), de Ayala kaj Marcau Soria? La melodioj estas, jen plendaj kaj kortuŝaj, jen gajaj

kaj spritaj, sed ĉiam plenaj de mildeco kaj kaj homa sento.

Nokte ni estis ricevitaj ĉe familio Segal, geonkloj de samideanino Sara Dorin, kiuj honorigis nin per tre agrabla kunveno. Oni kantis, deklamis, dancis kaj, precipe, la neesperantistoj povis konstati, ke nia lingvo estas ja fleksebla kaj belsona. Fakte, unu el la plej bonaj aferoj, kiujn mi konstatis ĉe la Argentina Kongreso estis precize tio: dum ĉiuj kunvenoj la esperantistoj parolis nur en Esperanto. Tio estis ja profita praktikado por tiuj, kiuj jam eklernis nian lingvon, kaj samtempe, la plej alloga varbilo por la neesperantistoj, kiuj ĉeestis niajn kunvenojn. Ĉe gesinjoroj Segal ni restis ĝis malfrue en la nokto.

En la 10-a, matene, okazis ekskurso, per motorboatoj, al najbaraj insuloj en la rivero Paraná. Feliĉe, en tiu tago la suno jam denove brilis, kaj tial ni povis pli oportune ĝui la agrablan promenadon. Sur belega loko nomata "Soto de la Moncloa" oni servis al ni bongustan rostitan viandon, nomatan, ĉe la argentinanoj, "asado criolo", kaj bonegan argentinan vinon. "Soto de la Moncloa" lokiĝas sur monteto ĉe la bordo de la rivero Paraná, el kie estas vidata idilia panoramo. Bone zorgita bosko igas la lokon tre taŭga por agrabla restado dum libertempaj tagoj.

Tiu ekskurso estis kvazaŭ adiaŭa festo, ĉar, iom post iom, devis foriri multaj el la partoprenantoj, kiuj bezonis akurate trafi la veturilojn returne. Pro tio, tiu laŭnatura, poezia kaj memoriga kunveno havis ankaŭ kortuŝajn momentojn, kaŭzatajn de la devigaj disiĝoj kaj ties konsekvencaj emociaj adiaŭoj.

Ĉiuj, kiuj foriris pli frue, estis akompanataj de kelkaj aliaj ĝis nemalproksime, dum la tuta grupo kantis hore nian klasikan "Ĝis Revido". La ceteraj foriris vespere, per omnibusoj. Tiel ni povis pli bone admiri la urbon, kaj pli certiĝi pri ĝiaj progresemaj industrio kaj komerco.

Malgraŭ la intense vivitaj tagoj, kiujn ni pasigis en tiu gastama urbo Rosario, ni sentis nin tute viglaj kaj entuziasmaj, kiam ni revenis al la hotelo por aranĝi niajn valizojn, celante la forveturon. La





# Brazila Kroniko

## RIO DE JANEIRO

— En la 14-a de Julio, de la 20-a ĝis la 21-a, en la ŝatata programo de S-ro Geraldo de Aquino per la stacio Rádio Mauá, nia fervora samideanino F-ino Hersila Valverde organizis belan disradiadon honore al Zamenhof. Dum tiu horo oni aŭdis deklamadon, kantojn, paroladetojn, kaj saluton de D-ro Carlos Domingues, prezidanto de B. E. L., sub la titolo «De Babelo al Pentekosto».

— Brazila Klubo-Esperanto inaŭguris la 4-an de Junio sian ĉi-jaran duan Esperanto-kurson. Enskribis sin multaj

dolora horo de la adiaŭo estis ja alveninta. Adiaŭ: vorto simpla, kiu plenigas niajn okulojn per larmoj, kaj nian koron per saŭdado.

Vere feliĉaj ja estas la esperantistoj, ĉar ili povas verŝi, pro universala sento, adiaŭajn larmojn, kiuj kronas sinceran kaj universalan amikecon.

La suno senhalte malleviĝadis ĉe la horizonto, kaj la mallumo iom post iom kovris la urbon.

Fine alvenis la momento de la foriro: Bondezirajn esprimojn. Amikajn fortajn ĉirkaŭbrakojn. Emociajn dankemajn vortojn.

Kaj la omnibuso foriris.

### Quotas de adesão para 1956

	AM	MJ	MA
Cr\$	50,00	100,00	200,00
	MS	Patr.	DM
Cr\$	300,00	800,00	4.000,00

gelnantoj, speciale personoj, kiuj antaŭ nelonge vidis la Esperanto-programon ĉe la Televido Tupi. Gvidas la kurson F-ino Irani Baggi de Araújo, sindona direktorino de B. E. L. La kurso konsistos el 20 lecionoj, kiuj okazas ĉiusabate je la 15-16 horo.

— La ekzameno pri la unua kurso, kiun gvidis nia samideano Aylton de Lima Rocha, okazis je la 13-a de Aŭgusto, kun bona rezultato.

— En la sama tago estis ekzamenitaj ankaŭ en Brazila Klubo Esperanto 20 gelernantoj de Instituto Bom Sucesso, en Bom Sucesso, kiuj sekvis kurson gviditan de S-ro Jorge de Souza Neves. Ĉiuj bone sukcesis kaj baldaŭ ricevos la Norman Elementan Diplomon, donatan de B. E. L. en la nomo de la Akademio de Esperanto.

— En la festsalono de Kristana Asocio de Junuloj okazis solena kunsido, sub la prezido de Prof. Oswaldo Diniz Magalhães, por disdono de diplomoj al la lernantoj, kiuj finis la Esperanto-kurson faritan sub la aŭspicio de la Asocio Radio-Gimnastoj.

**Agora em Esperanto a exemplar "Novela do Curioso Impertinente" que Cervantes introduziu na sua genial obra "Dom Quixote de la Mancha":**

**LA MALPRUDENTA SCIVOLULO**  
Novelo el la fama verko "Don-Kihoto"

Trad. do espanhol por Luis Hernández  
1 vol. ilustr. Cr\$ 40,00.

Serviço de Livros da BEL.